

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

EN LA NUMERO:

NIAJ INFANOJ —
NIA ESTONTO...

HONORINDA POETO
KAJ SOCIAGANTO

INTERVJOO SEN
DEMANDOJ

FLUGU, NIA
ESPERANTA KANTO!

BATALKAMARADO
ATANAS LAKOV

GEORGI DIMITROV
KAJ NIA
KOOPERATIVA

MOVADO

MALBONKONDUTA

KNABO

PAUTALIA



JARO 52 • N-RO 6 • JUNIO • 83

FLUGU,

NIA ESPERANTA

KANTO!...



Klubo „Juna Esperantisto“ — Sofio

KAZANLÂK — SIDEJO DE LA ĈI-JARA REVUO

De la 1-a ĝis la 3-a de aprilo ĉi-jare urbo Kazanlâk, situanta en la mondkonata Roza Valo, estis la laŭvica sidejo de la XVI Nacia Revuo de la Esperanta Kanto kaj Parolo.

La bela urbo Kazanlâk dronis en delikata verdaĵo, saturita de la milda spiro de l'printempo.

Promenante tra la urbo, ni vidis novajn modernajn loĝblokojn, sur la centra urba placo — la imponan konstruaĵon de la nova hotelo „Kazanlâk“, novan Centran Domon de la Kulturo, novan Junularan Domon. . .

La lokaj aŭtoritatoj montris saĝecon, konservante preskaŭ ĉiujn valorajn malnovajn konstruaĵojn en la urbo, kiu donis al Bulgario eminentajn kulturajn kaj soci-politikajn agantojn.

Du imponaj monumentoj gardostaras super la urbo — sur du Balkanmontaraj suproj, memorigante pri gloraj historiaj eventoj: la monumento sur montosupro „Stoletov“, konstruita memore al la pereintaj rusaj soldatoj kaj bulgaraj volontuloj en la Liberiga Rusa-Turka Milito (1877—1878) kaj la monumento-memorejo sur montosupro „Buzluĝa“, kie sub la gvidado de Dimităr Blagoev en 1892 okazis la Unua Fonda Kongreso de la Bulgara Socialdemokratia Partio.

(sekvas sur paĝo 8)



1-a de junio — Internacia Tago de Infanoj

NIAJ INFANOJ — NIA ESTONTO, NIA ESPERO...

Ci-jare pleniĝas dudek kvar jaroj, ekde kiam la Organizaĵo de Unuigintaj Nacioj akceptis la Deklaracion pri Infanrajtoj. Apenaŭ io alia povus unuigi tiel forte ĉiujn homojn de nia planedo kiel la problemoj pri la infanoj, pri iliaj vivnecesaj rajtoj. Tiu problemoj unuigas niajn agojn, niajn sentojn kaj pensojn, dediĉitajn al la bono kaj feliĉo de la infanoj — tiuj plej delikataj floroj de la vivo.

Cu estas en la mondo io pli kara ol la infanoj? Ja por ili ĉiu estas preta ĵeti sin en la fajron, ekstar kontraŭ militdanĝero. La infanoj estas simbolo de la estonto. La zorgoj pri ili estas zorgoj pri la morgaŭa tago. La infanoj estas nia ĝojo, nia fiero kaj konsolo. Pere de ili ni vidas nin mem en la estonto, ni esperas triumfon de niaj ideoj, de niaj revoj pri vivo pli bela, pli feliĉa ol la hodiaŭa.

La socialisma sociordo garantias pacon, feliĉon kaj liberan kreadon por ĉiuj infanoj en Bulgario. Tial ne hazarde en nia lando okazas periode la Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“. Tiu iniciato estas demonstro de la politiko de la Bulgara Komunista Partio kaj de la bulgara registaro, direktita al firmigo de la spirito de paco kaj paca kunekzistado, de komprenigo kaj kunlaboro inter la popoloj pere de proksimigo de ties infanoj. La Asembleo estas universala festivalo de la infana kreado.

Socialisma Bulgario estas modelo de zorgoj, kiujn la socio povus doni al la patrinoj kaj infanoj. Pri ili zorgas 2765 virinaj konsultejoj, 150 infanaj hospitaloj kun 8500 litoj, 1018 infanvartejoj kun 72 000 lokoj, 1048 pediatraj administraj, granda nombro de akuŝdomoj, infanaj sanatorioj k.t.p. En tiu branĉo laboras 2500 pediatroj, 1500 akuŝistinoj, pli ol 1100 aliaj fakuloj. Nun 100% de la naskiĝoj en Bulgario okazas en akuŝdomoj. Kia diferenco kompare kun kapitalisma Bulgario, kie ekzistis tute malgranda nombro da infanaj saninstitucioj: 4 infanaj hospitaloj kun

220 litoj, 3 infanvartejoj, nur kelkaj akuŝdomoj kaj eta nombro de virinkonsultejoj por la tuta lando. Ne estas mirinde, ke en 1936 mortis 146 el 10 000 vivnaskitoj ĝis unujara aĝo. Nun la infana mortokvanto en Bulgario estas ege malaltigita — 23,7 el 10 000. Tio estas rimarkinda atingo kaj ĝi vicigas Bulgarijon antaŭ tiaj evoluintaj kapitalismaj landoj kiel Usono kaj Britio.


Laŭ oficialaj donitaĵoj de UNESCO ĉ. 300 milionoj da infanoj en la mondo neniam satmanĝas, kaj ĉiujare pro malsato mortas 15 milionoj da infanoj de 1- ĝis 5-jara aĝo. En pli ol 40 landoj (precipe en Afriko, Azio kaj Polinezio) ne ekzistas leĝo pri deviga vizitado de lernejo.

Kaj kia estas la stato de la infanoj en la socialismaj landoj? Ni bonege konas tiujn sanajn kaj feliĉajn infanojn. Oni ofte povas ilin vidi ankaŭ en festivaloj kaj kongresoj, en internaciaj tendaroj kaj ekskursoj, en matematikaj kaj muzikaj konkursoj, en internaciaj sportludoj kaj korpulturaj festoj. En Bulgario la plej alta takso, kiun pagas la gepatroj por infano en vartejo, konŝtigas nur kvaronon de la realaj elspezoj — la ceterajn tri kvaronojn pagas la ŝtato. Ĉe ni lastatempe 330 000 infanoj pasigas parton de siaj someraj ferioj en 1100 ripoztendaroj kontraŭ minimuma pago.

La bulgara E-movado, nedisigeble ligita kun la batalo por paco kaj internacia komprenigo, vidas en la infanoj la morgaŭajn batalantojn por tiuj noblaj celoj pere de la Internacia Lingvo Esperanto. Partoprenante en diversaj agadformoj de BEA, ili lernas esti patriotoj kaj internaciistoj, enprofundiĝas en la socialisman kulturon de sia popolo, ekkonas kaj ekamas sian Patrujon. Tiamaniere la bulgaraj infanoj pruvigas sian kapablon ĝuste kompreni kaj efektiviigi en la vivo la politikon de la Partio, uzi Esperanton en la intereso de nia popolo.

HONORINDA POETO KAJ SOCIAGANTO

(ASEN GRIGOROV — 80-JARA)



La 29-an de marto j. k. en la Domo de Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo en Sofio okazis emociplena, kortuŝa festo: multaj batalkamaradoj kaj samideanoj de la elstara Esperanta aktivulo kaj poeto Asen Grigorov venis por celebri lian 80-jariĝon kaj por esprimi siajn respekton kaj amon al la kara jubileulo.

Nikola Aleksiev, honora prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj multjara batalkamarado de la jubileulo, tralegis **Salutleteron** de la Generala Sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario **Todor Jivkov** al Asen Grigorov lige kun lia 80-jariĝo kaj kun lia distingo per la plej alta ŝtata ordeno „Georgi Dimitrov“ — kiel rekono de liaj meritoj en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, en la konstruado de la socialisma socio en nia lando kaj de lia kontribuo al la bulgara kulturo kaj al la E-movado tutmonda.

Pri la vivovojo, soci-politika kaj Esperanta aktivado de Asen Grigorov parolis inĝ. **Petâr Todorov** — vicprezidanto de BEA, kaj **Kunĉo Vălev** — ĝenerala sekretario de BEA,

tralegis **Salutleteron al la jubileulo** en la nomo de Centra Estraro de BEA.

Amoplenajn vortojn al la jubileulo direktis liaj kunbatalantoj kaj kamaradoj **Petâr Popnikolov** kaj **Nikola Krušovenski** — en la nomo de la Centra kaj Sofia Urba Komitatoj de la Unuiĝo de Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo, **Kiril Andreev** — prezidanto de la Klubo de Poŝtistoj-Veteranoj, **Angel Todorov** — popola aganto de la kulturo kaj eminenta bulgara poeto, verkisto kaj tradukisto, kaj ankaŭ multaj aliaj amikoj kaj adorantoj de Asen Grigorov.

Honore al la jubileulo geaktoroj kaj muzikistoj-esperantistoj plenumis altnivelan belartan programon.

Kiel konate, Asen Grigorov estas Esperanta aktivulo-internaciisto, vaste konata en multaj landoj per sia poresperanta agado. Okaze de lia 80-jariĝo al li direktis salutleterojn E-organizaĵoj kaj apartaj personoj el USSR, Anglio, Japanio, Argentino kaj el multaj aliaj landoj.

Post du semajnoj — la 13-an de aprilo, laŭ deziro de multaj sofiaj esperantistoj, kiuj ne havis la eblecon viziti la oficialan jubilean feston, la Sofia Urba Estraro de BEA okazigis honore al Asen Grigorov literaturan belartan vesperon, kiu transformiĝis en intiman rentonigon inter amikoj, samideanoj kaj adorantoj de la eminenta poeto-esperantisto.

La ĝenerala sekretario de BEA **Kunĉo Vălev** emocie parolis pri la literatura kaj ĵurnalista agado de Asen Grigorov dum pli ol 60 jaroj.

Riĉenhavan literaturan programon el originalaj kaj tradukaj verkoj de la jubileulo prezentis recitantoj de diversaj generacioj.

Profunde emociite kaj kortuŝite, Asen Grigorov direktis varmajn dankvortojn al la ĉeestantoj pro la esprimita al li estimo, pro iliaj bondeziroj kaj donacoj, pro la belaj printempaj floroj — simbolo de amo kaj amikeco, kiu estis ĉiam reciproka dum lia tuta konscia vivo!...

D.S.Ĥ.

ESTU JUNKORA KAJ VERKKAPABLA!...

ĤRISTO GOROV,
prezidanto de BEA

Asen Grigorov apartenas al la plejado de bulgaraj E-funkciuloj, kies aktiva, persista kaj sindona laboro helpis por disvastigo de la Internacia Lingvo en nia lando.

Pasis pli ol 50 jaroj depost la tago, en kiu mi konatiĝis kun Asen Grigorov kaj lia edzino Ljuba. Ilia modesta loĝejo troviĝis en la proleta kvartalo de Sofio, kie li ĉiutage observis la mizerantajn laboristajn familiojn. Sed en la sama kvartalo loĝis eminentaj proletaj revoluciuloj kaj poetoj: Georgi Dimitrov, Ĥristo Smirnenski, Geo Milev, Ĥristo Jasenov, Krum Kjuljajkov k.a. Certe tiu cirkonstanco havis sian influon sur la vivovojoj de Asen Grigorov. En tiu kvartalo naskiĝis la ideo pri fondo de Laborista Esperanto-Asocio (LEA). Asen Grigorov estas unu el ĝiaj fondintoj. Al LEA li kontribuis ankaŭ per siaj poeziaĵoj, saturitaj per strebado al sociala libereco kaj

per malamo al la ekspluatantoj kaj subpreman-
toj.

En la komenco de la 30-aj jaroj sub la titolo „Ruĝa Aŭroro“ aperis kolekto de revoluciaj poemoj, instigantaj la esperantistojn al klasbatalo, alvokantaj al defendo de la unua en la mondo ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj:

Al vi, proleta land' etendas ni la brakojn,
al vi solene sonas nia ĵura kant':
rebatos ni la kuglojn, rebatos la atakojn
je vi, libera land'.

Tiu ĉi malmultpaĝa libreto, subskribita per la pseŭdonimo **Ljubin**, estis vera ruĝa aŭroro, aperinta super nia horizonto. Ĝi tuj elĉerpigis kaj sekvis la dua eldono.

Sovetaj kamaradoj alte pritaksis ĝian enhavon. En numero 8-9/1934 de la ruslingva revuo „Mejdunarodnij Jazik“ („Internacia Ling



E-veterano Stojan Kostadinov gratulas la jubileulon.



Profunda rekono en la nomo de sofia E-societo „Heroldo“.

vo“) la konata soveta esperantisto-poeto Eŭgeno Miĥalskij skribis: „Li estas poeto de la leviĝanta laborista klaso. Li ne kantas nur pri la malbonaj kondiĉoj de laboristaj infanoj, pri malsato kaj mizero; li kantas pri la batalo kontraŭ kapitalismo, pri la proksimiĝanta sturmo de la proleta mondo“.

Dum la monarko-faŝista diktaturo, kiam ĉion kontrolis cenzuristoj, estis vivdangere streĉi la kordojn de la proleta liro kaj prikanti la liberecon. Por Asen Grigorov tio estis multe pli danĝera, ĉar li oficis en la Ministerio de Poŝto kaj Telegrafo. La faŝistaj aŭtoritatuloj severe persekutis verkistojn kaj ĵurnalistojn, kiuj staris ĉe la flanko de la klaskonscia proletaro. Tamen li daŭrigis sian revolucionan verkadon.

En la komenco de la dudekaj jaroj Asen Grigorov kunlaboris al „Bulgara Esperantisto“ kaj „Balkana Konkordo“. En 1929 li kune kun Nikola Aleksiev, Atanas Lakov kaj Simeon Petrov partoprenis la redaktadon de revuo „Balkana Laboristo“. Tiu ĉi revuo liveris tribunon al pluraj verkemaj kamaradoj — Dimităr Zlatarski, Ĥrima, David Sasonov k.a.

Gravan rolon por la propagando de Esperanto inter laboristoj ludis la redaktata de N. Aleksiev „Mejdunaroden Rabselkor“, al kiu kunlaboris Asen Grigorov. En tiu ĉi periodaĵo regule aperadis korespondadoj kaj eseoj de sovetaĵaj esperantistoj. Dank’ al tio „Mejdunaroden Rabselkor“ tre efike propagandis la atingadojn de l’socialismo en la unua laborista-kampana ŝtato.

Post la ŝtatrenverso en 1934, kiam la legala ekzistado de LEA estis malpermesita, Asen Grigorov fariĝis redaktoro de la Esperanto-paĝo en la ĉiutaga gazeto „Zarja“.

Krom la agado en gazetoj, Asen Grigorov laboris kiel vortaristo, kompilanto de lernolibro, tradukisto. Li konigis al la internacia esperantistaro talentajn bulgarajn poetojn — Ĥristo Botev, Ĥristo Smirnenski, Krum Kju-ljajkov k.a.

Asen Grigorov aktive partoprenis la organizitan laboristan movadon. Jam en 1928 li aliĝis al la Komsomolo. Unu jaron post tio oni akceptis lin en la partio de bulgaraj komunistoj kaj li fariĝis profesia revoluciulo. Sub la gvidado de la septembra heroo kaj interbri-

gadisto, membro de Politburoo de CK de BKP Vlado Georgiev li eklaboris en la nelegala presejo de la Komunista Partio. Li redaktis la partian organon „Rabotniĉesko Delo“, alvokojn kaj direktivojn, per kiuj oni kuraĝigis nian popolon batali kontraŭ la faŝista pesto. La nelegala laboro en la redakcio de „Rabotniĉesko Delo“ estis vivdangera, sed Asen Grigorov faris ĝin akurate kaj sinofere. En 1941 la polico sukcesis trovi la presejon kaj arestis la gvidanton de la presejo, la redaktoron kaj la du kompostistojn. Oni enkarcerigis ilin en la Centra Malliberejo de Sofio.

Dum tri jaroj li suferis en diversaj malliberejoj, ĉe punlaboro en ŝtonminejo Breĵane. Li revenis al sia familio en 1943 kaj daŭrigis sian partian laboron, ĉar la momento estis gravega — la reganta klaso submetis nian landon al vasaleco de Hitler.

Alvenis la decidiga por la sorto de Bulgario 1944 jaro. La faŝista kliko staris antaŭ katastrofo. Proleta Sofio estis batalpreta. Sur la stratoj kolektiĝis batalantoj, eksplodis strikoj. Kune kun la demonstraciantoj estis ankaŭ Grigorov. Li estis arestita kaj malbontraktita, sed feliĉe ĉi-foje nur por kelkaj tagoj. Venis la Naŭa de Septembro. Batalgrupo atakis la policejojn kaj liberigis la arestitojn.

Grigorov estas libera. Kiel fidelan kaj konsekvencan antifaŝiston oni enoficigas lin en la aparato de CK de BKP. Li respondecas pri la teknikaj servoj de Politburoo.

Post la reveno de Georgi Dimitrov en Bulgariion, Asen Grigorov fariĝis lia persona sekretario kaj estro de lia kancelario. La oficado ĉe la ministro-prezidanto estas streĉa kaj tre respondecata, sed Grigorov faras ĉion kun fervoro kaj obstino. Pri tiu periodo de sia vivo li skribis detalajn rememorojn, interalie pri la rilato de G. Dimitrov al Esperanto. La streĉa laboro elĉerpis la fortojn de Grigorov kaj li petis eksigon, cedis sian oficon al juna kamarado, ankaŭ esperantisto — Cvjatko Banĉev. En 1948 Asen Grigorov transiris al laboro en la Ministerio de Stata Kontrolo, kiel respondecata sekretario kaj redaktoro de revuo

„Stata Kontrolo“. En 1958 li emeritiĝis, sed tio ne signifis por li ripozon. Li entute dediĉis sin al la Esperanto-movado. Li redaktis la revuon „Internacia Kulturo“ kaj post ties ĉesigo prenis sur sin la gravegan taskon redakti revuon „Nuntempa Bulgario“.

„Nuntempa Bulgario“ havis pli ol dek mil abonantojn en la mondo. Dank' al tiu revuo la monda esperantistaro informiĝis pri la socia progreso en nia lando. Persia tuta energio Grigorov faris ĉion eblan por plibonigo de la revuo — li arigis ĉirkaŭ si junajn kaj maljunajn esperantistojn, utiligis la sperton de la malnovaj, helpadis la komencantajn tradukistojn kaj aŭtorojn.

Sur la paĝoj de „Nuntempa Bulgario“ regule aperadis informoj pri la Esperanto-movado enlanda kaj eksterlanda. La revuo konkeris por si indan lokon inter la esperantista gazetaro en la mondo.

Post la ĉesigo de „Nuntempa Bulgario“ Asen Grigorov ne restis kun krucitaj brakoj. Li komencis redakti la bultenon „Interligilo“ — organo de la Internacia Ligo de Poŝtistoj kaj Televidaj Oficistoj. Nun li estas membro de la redakta komitato de revuo „Paco“. Jam 20 jarojn li estas gvidanto de literatura rondo, kie li zorgas pri kreskigo de novaj talentoj.

La bulgaraj esperantistoj kaj ankaŭ la internacia esperantistaro alte taksas la meritojn de Asen Grigorov. Dum ses jardekoj li metis multajn orajn brikojn en nian verdstelan konstruaĵon: tio estas la verskolektoj „Garbo“, „Ruĝa Aŭroro“ kaj „Gardu la pacon!“, la rakontaro „La himno“, lernolibro, vortaroj Esperanto-bulgara kaj bulgara-Esperanta; broŝuro por kursgvidantoj „Kiel instrui Esperanton“ kaj centoj da artikoloj, dissemitaj en bulgaringvaj kaj Esperantaj gazetoj.

Nun nia arda deziro estas, ke li restu ankoraŭ multajn jarojn junkora kaj verkkapabla, ke li plu laboru por nia movado kun persisto, aktiveco kaj sindono kaj donacu al la legantoj de Esperantaj gazetoj plurajn novajn versaĵojn pri paco kaj amikeco inter la popoloj.

INTERVJUO SEN DEMANDOJ

Kun k-do Asen Grigorov min ligas ne nur la komuna antaŭnomo, sed ankaŭ la intereso al Esperanto. Li ne ŝatas bruajn intervjuojn kaj afektoplenajn pozadojn, ĉar li mem en sia vivo estas tute natura kaj sincera. Li invitis min per ĝentila letero: „Se vi decidus viziti min, mi tre ĝojus“. Kaj mi senprokraste profitis la okazon. En lia hejmo — en la pensiono de Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo en Gorna Banja, proksime al Ljulin-monto, mi devis iom atendi lian revenon de la posttagmeza promeno en la apuda arbareto.

Mi anticipe decidis starigi al li kelkajn demandojn, sed post la unua demando mia gastiganto ne ĉesis paroli preskaŭ ĝis la fino. Mi decidis lasi lian penson flui kaj evitis interrompi lin. Mi nur penis memorfiksi tion, kion li dividis kun mi.

Kompreneble, ni parolis pri Esperanto. Komence li tuŝis la temon pri la granda facileco de Esperanto. Li opinias, ke malgraŭ ke Esperanto estas multoble pli facila ol la ceteraj, t.n. naturaj lingvoj, ankaŭ ĝi havas siajn malfacilaĵojn. Dum mia unuhora gastado li fojfoje konsultis la Plenan Ilustritan Vortaron por citi al mi gramatikajn regulojn, okazojn, kiam iuj bulgaraj esperantistoj stumblas, ne ĝuste komprenas ilin, troviĝante sub la influo de la gepatra lingvo. Laŭ lia opinio, oni devas sisteme ĉiutage okupiĝi pri nia lingvo. Iuj personoj kalkulas nur je vizito de Esperanto-kunvenoj, internaciaj kongresoj k.a. aranĝoj. Tamen tiuokaze ordinare oni ne multe parolas („De kie vi estas?“, „Kio estas via profesio?“).

Poste mi komprenis, kian altan renomion kaj aŭtoritaton li havas meze de alilandanoj. Ekzemple, sur iu finna insulo, donacita de la finna registaro al la poŝtistoj el Helsinki, evidentiĝis, ke neniu krom nia ŝatata „vivanta vortaro“ (kiel oni ŝerce lin nomas, sciis la vorton **mirtelo**, kiam oni vidis mirtelojn, pli ofte renkonteblajn en Finnlando ol en Bulgario).

Subite li demandis min kion signifas **upupo** kaj **urogalo**, kaj ricevinte de mi neplenan, nekontentigan respondon („birdoj“), li delikate turnis mian atenton sur la fakton, ke oni devas

lerni multajn vortojn, se oni pretendus, ke Esperanto estas lingvo plenvolora, ne malpli riĉa ol multaj naciaj lingvoj.

Laŭ li en multaj okazoj la pli mallongaj vortformoj estas preferindaj, en okazoj kiam neniu risko pri miskompreno ekzistas, ekzemple **limita** anstataŭ **limigita**, **fridujo** anstataŭ **fridigujo**.

Rilate la legmanieron li rekomendas, ke oni devus eltiri la maksimuman utilon el ĝi. Ekzemple, li mem legas ĉiam kun krajono en la mano, por noti sur la margenon de la libroj ĉiun interesan vorton, vortkombinon, esprimon, kaj poste reskribas ilin en specialan kaje ron.

Mi eksciis, ke li havas kartotekon el dosieroj de siaj korespondantoj laŭ loĝlokoj (ekz. Varna), krome li ĉiam lasas al si kopiojn de la de li skribitaj leteroj. Similan aranĝon de miaj korespondaĵoj mi tuj kun danko realigis hejme.

Kaj fine li ekparolis pri la Esperantaj libroj, kiujn li relegas, pri siaj preferataj aŭtoroj. Mi rememoris, ke li donacis al la Esperanto-Muzeo pli ol 1000 librojn — modelo imitinda ankaŭ de aliaj.

Ne nur la grandega informiteco, instruiteco, riĉa Esperanta kaj ĝenerala kulturo de Grigorov impresas la vizitanton, sed ankaŭ liaj sincereco, afabla atento, eruditeco kaj trafa sagaco, kiuj multrilate pliriĉigas spirite la kunparolanton. Sed nur kiam mi estiĝis ano de la Literatura Rondo, gvidata de li jam 20 jarojn, mi komprenis, kie li estas malavara je klarigoj kaj priliteraturaj konsiloj.

Mi adiaŭis mian afablan gastiganton kun la konvinko, ke efektive oni devas ĉiutage lerni Esperanton, konstante uzi ĝin buŝe kaj skribe, paroli bonstilan literaturan Esperanto, evitante deflankiĝon de ĝiaj gramatikaj reguloj kaj norma vortaro, ke oni ne komplikula lingvon, ke oni strebu al mallongeco, simpleco kaj klareco de la penso. Kaj mi havis la senton, ke mi ĵus ricevis modelan altnivelan lecionon de nia eminenta poeto, longjara redaktoro, senlaca sociaganto kaj arda Esperanto-aktivulo.

Asen JOSIFOV

DANKPAROLO DE LA JUBILEULO

*Karaj kamaradinoj kaj kamaradoj,
Karaj gesamideanoj,*

En tiu ĉi por mi neordinara kaj memorinda momento mi adresas varmegan dankon pro la korvarma letero de nia unua partia kaj ŝtata gvidanto, kamarado TODOR JIVKOV, kun kiu mi havis la feliĉon labori kaj kiun mi alte taksas jam de la malproksima nelegala pasinteco.

Mi fieras, ke longajn jarojn mi apartenas al la vicoj de unu el la plej revoluciaj taĉmentoj de nia laborista klaso — la laboristoj en la sfero de komunikado.

Nia profesio donis tiajn sindonajn kaj kuraĝajn batalantojn kiel Avram Stojanov, Dragoj Koŝejkov, Todor Praŝov kaj multajn aliajn. Pri la politika memkonscio de komunikistoj parolas ankaŭ la proceso en la sistemo de PTT (Poŝto, Telegrafo, Telefono) fine de 1941, kiu finiĝis per rekorda nombro de mortkondamnoj — pli ol 30! Tie ĉi, en tiu salono, mi estas feliĉa vidi kaj malnovajn kamaradojn poŝtistojn kaj iliajn helpantojn: Stefan Gabrovski, Petăr Popnikolov, Ivan Alaĝov, Simeon Kolencov, Nikola Kru-

šovenski, Ilija Kostov, Stojĉo Stojĉev, kamaradon Kiril Andreev, nian karan Esperanto-veteranon Meleŝko Siŝkov kaj aliajn, kies plimulto ricevis mortkondamnoj. Pluraj el ili estis samtempe esperantistoj!

Mi estas feliĉa, ke mi havis la mirindan sorton esti unu el la agantoj de nia Esperanto-movado. Sed ankaŭ tie ĉi mi volas emfazi, ke mia modesta kontribuo en tiu movado estus neebla sen la apogo kaj la helpo de tiaj gvidantoj de nia movado kiel Nikola Aleksiev, Ĥristo Gorov, Violin Oljanov, Stojan Kostadinov kaj aliaj veteranoj kaj fidelaj amikoj en mia aktivado.

Jen kial, dankante la iniciatintojn kaj la organizintojn de tiu ĉi solena kunveno, mi opinias, ke la al mi montritaj honoro kaj rekono devas fakte esti adresitaj ankaŭ al ĉiuj konataj kaj nekonataj, grandaj kaj malgrandaj kamaradoj, kun kiuj mi havis la feliĉon labori pli ol 60 jarojn, dum mia tuta konscia vivo.

Mi esprimas mian profundan dankon al vi ĉiuj, kamaradinoj kaj kamaradoj, kiuj honoris min per sia ĉeesto kaj min salutis okaze de la okdeka datreveno de mia naskiĝo.

Al nia rondestro

Akrostike kaj ame al la meritoplena
E-aktivulo Asen Grigorov, longjara
sperta kaj saĝa gvidanto de la Literatura Rondo, okaze de lia 80-jariĝo.

Al vi, verdstela veterano,
Salutleteron ĉi direktas
Elkore ni, verkistrondanoj;
Nun version gloran por vi plektas.
Gvidanto de beletra rondo,
Revante vi talentojn flegas,
Intime ĉiujn vi inspiras,
Gastame bonvenigas, legas,
Ornamas penson; plibonigas,
Redaktas, kontestebilon traktas.
O, nia kara multjarulo,
Vi havu koron de junulo!

Asen JOSIFOV

FLUGU, NIA ESPERANTA KANTO!...

(daŭrigo de paĝo II)

MALFERMO DE LA REVUO

La esperantistoj el societo „Roza Valo“ en Kazanlâk, dommastroj de la ĉi-jara XVI Nacia Revuo de la Esperanta Parolo kaj Kanto, korvarme kaj gastame bonvenigis kaj lokis la centojn da partoprenintoj kaj gastoj de tiu plej granda ĉi-jara kultura aranĝo de BEA, dediĉita al la 60-jariĝo de la unua en la mondo Kontraŭfaŝisma Armita Ribelo en septembro 1923.

Ĉiam impresas la ĉarma, kortuŝa etoso, kiam geesperantistoj el diversaj generacioj kaj el diversaj landpartoj renkontiĝas por partopreni tutlandan E-aranĝon. Kvazaŭ renkontiĝo de membroj de unu granda familio!... Tiel estis ankaŭ en Kazanlâk en la antaŭvespero de la Revuo: la partoprenintoj de la pasintaj konkursoj denove renkontiĝis kiel amikoj kaj rivaloj en la ĉi-jara aranĝo.

La 2-an de aprilo matene, en la salono de la Domo de Konstruistoj, okazis la solena inaŭguro de la Revuo.

La prezidanto de la Urba E-societo „Roza Valo“ Kiril Ĉindin elkore salutis la ĉeestantojn

en la nomo de geesperantistoj el la urbo de rozoj Kazanlâk.

Inĝ. Petâr Todorov, vicprezidanto de BEA, salutis la partoprenantojn kaj la gastojn en la nomo de CE de BEA. Li alte pritaksis la gravecon de tiu ĉi tutlanda E-aranĝo por la bulgara E-movado ĝenerale kaj por la plua popularigo de la Internacia Lingvo en ĉiuj medioj de nia socio.

La ĉeestantojn salutis ankaŭ la prezidantino de Bulgara Esperantista Junularo Steliana Dimitrova, kiu bondeziris al ili sukceson en la antaŭstaranta nobla konkurado.

Post la oficiala inaŭguro de la Revuo reprezentanta grupo el Velingrad metis florkronon antaŭ la monumento de la fama bulgara patriot-komunisto kolonelo Cvjatko Radojnov, pereinta en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo.

En la naskiĝloko de kolonelo Radojnov, vilaĝo Krân, proksime de Kazanlâk, troviĝas unu el la plej riĉaj en nia lando privataj kolektoj de esperantaĵoj, aranĝita de la fervora longjara esperantisto Dimo Martinov.

Interalie, ankaŭ kolonelo Cvjatko Radojnov estis esperantisto.



[Folkloro ensemblo el vilaĝo Gorno Dragliŝte — Blagoevgrad-distrikto

LA OPINIO DE LA JURIO

Donĉo Ĥitrov, prezidanto de la ĵurio por I kaj II grupoj:

— La partoprenintoj en la Revuo estis dividitaj en du grupojn, kies plenumojn devis prijuĝi du apartaj kompetentaj ĵurioj.

La etaj plenumantoj el I kaj II grupoj sin prezentis en la Domo de Tekniko, kaj la plenumantoj el III kaj IV grupoj — en la Domo de Konstruistoj. La tutan tagon en ambaŭ salonoj oni povis ĝui la noblajn strebojn de la plenumantoj sin prezenti kiel eble plej bone, meriti la altan pritakson de la ĵurio.

Ce la etuloj ni konstatis sufiĉe bonan prononcadon de Esperanto kaj naturan sintenadon — speciale ĉe la deklamado. Tamen estis evidentaj manko de profesia reĝisora helpo, certa streĉiteco kaj rigideco sur la podio. Estis iuj ne tre sukcesaj provoj realigi interesan enscenigon ĉe recitaloj kaj muntaĵoj (ekz. „Disbatitaj, sed ne venkitaj“ — grupo el Plovdiv kun gvidantino Vesela Kurteva; el Ĥaskovo — kun gvidantino Maria Veleva; el Pazarĝik — kun gvidantino inĝ. Grozdenka Filipova k.a.)

Kiel kutime, post la fino de ĉiu Revuo de E-Parolo kaj Kanto, nia devo estas fari la koncernajn konkludojn, por ke la lingva kaj arta nivelo de tiu plej alta kultura manifestado senĉese plialtiĝu. Speciale ni volus turni atenton sur la individuan kaj kolektivan kantadon, kies nivelo estis evidente malalta. Oni ne devas sin prepari nur dum kelkaj tagoj aŭ semajnoj antaŭ la revuo, oni devas obs-

tine pliperfektigi sian programeron almenaŭ dum kelkaj monatoj, serĉi helpojn de spertuloj. Niaj amikoj el la landaj E-societoj, kiuj senpere respondecas pri la sinpreparo de unuopuloj aŭ de kolektivoj, devas konsulti specialistojn ne nur pri la programeroj, sed precipe pri la kapabloj de la plenumantoj.

Malgraŭ ke la arta nivelo de la plenumoj ĉiam ankoraŭ ne estas tre alta, tamen la nombro de la partoprenantoj kreskas — la ĉi-jaran revuon partoprenis pli ol 400 gelernantoj kaj pli aĝaj amatoroj el la tuta lando! Unu el la kaŭzoj pri tio certe estas la enkonduko de Esperanto en IX kaj X klasojn de la mezlernejoj kaj la organizo de pli multaj kursoj por E-instruistoj. Memkompreneble, la ĉiujaraj E-revuo kaj belartaj naciaj kaj internaciaj E-recitaloj en nia lando ebligas al la dezirantoj sin prezenti antaŭ publiko, kompari siajn kapablojn kun tiuj de aliaj plenumantoj.

Tio estas la plej grava kaj kuraĝiga rezulto de niaj belartaj E-aranĝoj! . . .

Kunĉo Vălev, prezidanto de la ĵurie por la aĝo pli alta ol 14 jaroj:

— Pritaksante la ĝeneralan nivelon de la ĉi-jara Revuo de la Esperanta Parolo kaj Kanto en Kazanlâk mi trankvile povas diri, ke ĝi estis unu el la plej altnivelaj el ĉiuj ĝisnunaj. Pli artisma estis la plenumo (parolo kaj muziko), pli korekta estis la lingvaĵo, pli bona — la prononcado; mankis la tedaj parazitaj ges-



Junaj entuziasmuloj pri Esperanto el Novi Pazar



Sofia junpionira E-grupo „Verdaj Steletoj“

Fotoj: Lada Milkova

toj, kiujn kelkiam apartaj plenumantoj senbezzone faras. Ĉion ĉi ni certe ŝuldas al la zorgoj de niaj distriktaj kaj societaj estraroj rilate la preparlaboron de la partoprenantoj en la programoj. En marto ĉi-jare unuafoje estis organizitaj anticipaj distriktaj revuoj, kiuj, malgraŭ la multaj organizaj mankoj, ankaŭ ludis pozitivan rolon. Estonte oni devas organizi similajn revuojn en ĉiu distrikto.

Kiel ĉiam, unu el la ĉefaj kaŭzoj, pro kiuj niaj sukcesoj ne estas tiel brilaj, kiaj ili povus esti, mi vidas en la mallonga tempo, dum kiu sin preparas la partoprenantoj en la programo. Kutime oni nur en januaro aŭ eĉ en februaro komencas fiksi la programerojn, kaj por preparado de la plenumantoj mem restas tute nesufiĉa tempo. Tiun praktikon oni devas radikale ŝanĝi: la programojn oni devas prepari jam en oktobro-novembro kaj ekde januaro devas komenciĝi la provludoj mem.

Tre grava estas ankaŭ la trafa elekto de plenumantoj. Ĉi tie decidigaj devas esti nur la personaj kvalitoj. Kelkfoje tamen oni altiras iun personon nur pro tio, ke tiu estas bona aktivulo en la loka societo aŭ — ege bedaŭrinde! — ĉar tiu estas filo (filino) de amiko aŭ konato. Por nia celo estas necesaj ne aktivuloj, sed talentuloj — t.e. personoj kapablaj en la sfero de arto.

Atentante la apartajn programerojn, ni ĉiuj sentis la bonan efikon tie, kie oni havis la hel-

pon de kompetentulo (reĝisoro, artisto, muzikisto, pedagogo). Bedaŭrinde, multloke oni tiun helpon ne serĉas kaj la realaj eblecoj de la plenumantoj ne plene realiĝas.

Manko de la ĉi-jara Revuo estis la nesufiĉa nombro da partoprenantoj en la oratora konkurso. Vere strange estas kial la lokaj estraroj subtakdas tiun bonegan formon. Ja kian efikforton, kian kuraĝigan ekzemplon prezentas la elokvente interpretita, prezentita eldiro, la bele farita prelego aŭ parolado!

Gojiga fakto en la ĉi-jara Revuo estis la partopreno de samideanoj pli aĝaj ol 35 jaroj. Tio estas tre bona paŝo! Do estonte niaj revuoj ne plu devas esti nur por gejunuloj, sed por ĉiuj aĝoj, por ĉiuj, kiuj ŝatas reciti, kanti, aktori ktp. Konata fakto estas, ke ĉe tiu ĉi kategorio de homoj la koro ĉiam restas juna kaj la spirito — vigla!

Nova estis ankaŭ la sistemo de pritaksado. Ĉi-jare ni aplikis la sistemon de poentoj. Ĉu efektive ĝi estas la plej bona por ni, por nia amatora arto, oni devas ankoraŭ pensi.

Konklude oni povas diri, ke Esperanto jam havas sian lokon en la amatora agado de la bulgara junularo. Bulgaraj geknaboj, sub la gvidado de siaj instruistoj, kantis kaj deklamis en Esperanto kaj el iliaj buŝoj, per la sincera flamo de la juneco, sonis bona Esperanta parolo!

Sofio — Kazanlak,
aprilo 1983

D. SIMEONOV
L. RAEVA

LISTO DE LA PREMIITOJ

EN LA XVI NACIA REVUO DE LA E-PAROLO KAJ KANTO

INDIVIDUAJ PREMIOJ

RECITADO

ANTAŬLERNEJA AĜO

- I Ljubomira Budinova — Velingrad
- II Ilijana Petkova — Stara Zagora

1—4 KLASOJ

- I Donka Veleva — Ĥaskovo
- II Teodora Ruseva — Varna
- Kalinka Georgieva — Razgrad
- III Biserka Borisova — Pavlikeni

5—8 KLASOJ

RECITADO

- I Daniela Kirilova — Ĥaskovo
- II Grigor Venelinov — v. Blagovo, distrikto de Miĥajlovgrad
- Kalinka Georgieva — Razgrad
- Anelija Koeva — Gorna Orjaĥovica
- III Gjulten Kerimova — Târgoviște
- Marina Uzunova — Ĥaskovo
- Darinka Radenkova — Svoge
- Kuraĝigaj — Nadka Daskalova — Ĉepelare
- Temenujka Kirilova — Ŝumen

KANTOJ

- III Silvija Meĉkarska — Velingrad
- Nikolina Todorova — Pazargĥik

9—11 KLASOJ

RECITADO

- I Daniela Sirakova — Gorna Orjaĥovica
- II Pavlina Nikolova — Svoge
- III Tanja Vaĉeva — Svoge
- Elena Pavlova — Svoge

KANTOJ

- Kuraĝiga — Jordanka Petkova — Botevgrad

PLI AĜAJ OL 18 JAROJ

RECITADO

- I Antoaneta Panova — Gorna Orjaĥovica
- II Stamenka Dimitrova — Botevgrad
- Nikolina Takova — Ĉepelare
- Stefka Sirakova — Plovdiv
- III d-rino Tjuran Omer — Loveĉ
- Lili Vodenicaŕova — Velingrad
- Angelina Gjurova — Plovdiv
- Stama Pankova — Bankja
- Kuraĝiga — Doĉka Dolapĉieva — Kazanlâk

KANTOJ

- I Ledi Petrova — Gorna Orjaĥovica
- Dobrinka Todorova — Miĥajlovgrad
- III Petâr Kavalĝiev — Ruse
- Kuraĝiga — Galja Vasileva — Ruse

ORATORA KONKURSO

- I Nikola Pilev — Ĥaskovo
- II d-rino Tjuran Omer — Loveĉ
- III Cvetka Teslakova — Velingrad

KOLEKTIVAJ PREMIOJ

RECITADO

1—4 KLASOJ

- I Ensemblo el Plovdiv — gvidanto Veselina Kurteva

5—8 KLASOJ

- I Ensemblo el Pazargĥik — gvidanto inĝ. Grozdenka Filipova

9—11 KLASOJ

- II Klubo „Juna Esperantisto“ — Sofio
- E-grupo el Svoge — gvidanto Elena Radenkova
- III E-grupo el Trojan — gvidanto Pavel Pajmakov

KOLEKTIVAJ KANTOJ

1—4 KLASOJ

- III Ensemblo el Kazanlâk

5—8 KLASOJ

- I Ensemblo el v. Gorno Dragliște — distrikto de Blagoevgrad
- III Ensemblo el v. Dâlboki — distrikto de Stara Zagora — gvidanto Rusi Saĥnev

9—11 KLASOJ

- II Estrada grupo el Blagoevgrad — gvidanto Stamenka Dimitrova

PLI AĜAJ OL 18 JAROJ

- I Kantgrupo el Burgas — gvidanto P. Janeva
- II Kantgrupo de nevidantaj esperantistoj el Plovdiv — gvidantino V. Karparova

KOLEKTIVAJ MUNTAĴOJ

1—4 KLASOJ

- II Ensemblo el Varna — gvidanto Saša Nedeva
- III Ensemblo el Târgoviște — gvidanto Marija Rajĉeva

5—8 KLASOJ

- I Ensemblo el Ĥaskovo — gvidanto Maria Veleva
- II Ensemblo el Madan
- Ensemblo el Velingrad
- III Ensemblo el Ĥaskovo — gvidanto Zlatka Denĉeva

9—11 KLASOJ

- II E-grupo el Gorna Orjaĥovica
- E-grupo el Karnobat — gvidanto Janka Ilieva

PLI AĜAJ OL 18 JAROJ

- I Iva kaj Neli Ivanovi el Sofio
- II E-grupo el Smoljan
- III Ensemblo el Miĥajlovgrad

DU SPECIALAJ PREMIOJ

- Petja Janeva el Burgas — pro komponado de melodioj al E-teksto
- Familio Trajanov (gepatroj kaj du filinetoj el Bankja) — pro kolektiva familia recitado
- Trupo el Bankja — pro originala enscenigo

JURIO PRI I KAJ II GRUPOJ:

- Prezidanto: Donĉo Ĥitrov
- Membroj: Maria Angelova
- Violin Oljanov

JURIO PRI III KAJ IV GRUPOJ

- Prezidanto: Kunĉo Vâlev
- Membroj: Angelina Sotirova
- Dimitâr Denĉev

ATENTO AL LA DENASKAJ LINGVOUZANTOJ



MIKSITECO de esperantistaj societoj ne malofte bremsas la evoluon de la Movado: fakuloj preferas agadi en la rondo de samfakuloj, junuloj laŭeble serĉas kontakton ne nur kun veteranoj, la pli aĝaj homoj same havas siajn dezirojn kaj idealojn, ankaŭ la infanoj bonfartas pleje en infana medio.

Precipe ili, la denaskaj esperantistaj infanoj, bezonas kaj meritas specialan zorgon de la Movado. Klubaj kunvenoj, la tradiciaj Esperanto-arangoj, kie prezentas sin amase komencantoj, anstataŭ firmigi la jam akiritan lingvoscion de infanoj, rapidigas ilian seniluziigon pri Esperanto. Precipe pro tiuj kaŭzoj estas valoraj Renkontoj de Esperantistaj Familioj (REF), kaj ankaŭ aliaj, tre maloftaj porinfanaj arangoj, kiel ekzemple Pupteatra Internacia Festivalo aŭ Infana Kongreseto de UEA.

REF ne estas arango ĉefe por la plenkreskaj familianoj, sed por la plej junaj infanoj, por denaskaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne havas la kapablon memstare eniri la medion de samaguloj pro la simpla fakto, ke esperantistaj familioj loĝas dise tra la mondo.

La pasintjara REF, jam la kvara, okazis en Hungario, for de urboj kaj vilaĝoj, en izolita montara domo, kie krom la aliĝintaj familioj ĉeestis neniu. Tiel povis okazi senĝene amika kunloĝado, ankaŭ ĉiutaga kunlaborado pri la necesaj farendaĵoj: preparo de mangoj, ĉambrordigoj, kolektado de arbaraj fruktoj kaj ligno, por fari vespere fajron. Libervole, eĉ plezure la infanoj partoprenis en ĉiuj agadoj. Dume okazis senĉesa babilado, kompreneble, ne nacilingva. La ĉeestantaron konsistigis hungaroj, kroatoj kaj poloj, inter ili 8 denaskaj esperantistaj infanoj en la aĝo de 3 ĝis 8 jaroj. Kiel ĉiam dum REF, la infanoj grandparte jam konis unu la alian, eĉ amikiĝis en la antaŭa tempo. Sed ĉeestis ankaŭ novuloj, kiuj facile akordiĝis kun la aliaj, pli spertaj, pli aĝaj.

Kutima urba komforto mankis, tamen neniu plendis, neniu grumblis aŭ enuis; la senlima inventemo de la infanoj kaj la naturo mem diktis la programon tre varian. Kiel la regulaj mangoj, tiel ripetiĝis ankaŭ programeroj: matene la infanoj gimnastikis, posttagmeze okazis danco- kaj kantolernado; la infanoj ĉiutage, sen instigo, post la tagmango legis esperantlingvajn fabelojn, por si mem aŭ laŭte, por la pli junaj, kiuj ankoraŭ ne scipovas legi.

La infanoj estis surprize memstaraj, kion pruvas i.a. kvazaŭ sekrete preparita programo kun kantoj, pupteatra prezento kaj dancoj (kiujn du infanoj lernis dum la Infankongreseto en Belgio). Pro tiu memstareco la gepatroj havis sufiĉe da tempo por priparoli edukajn kaj aliajn interesajn temojn.

Ĉar la ĉeestantaro povis vidi denove la utilon de la arango, oni decidis okazigi la Renkonton ankaŭ ĉi-jare, de la 7-a ĝis la 12-a de aŭgusto en Hungario — Sümeg (Inf.: Departemento Komitato de HEA, Várpalota, Pt. 67, H—810).

Simile kiel en la antaŭaj 4 jaroj, REF ankaŭ en 1983 havos novan karakteron kun nova ĉefprogramo. Dum la unua REF (1979, Hódmezővásárhely, Hungario) oni okazigis seminario pri infana dulingveco. Poste (1980, Szonibathely, Hungario) la partoprenantoj spektis eksperimenton kaj pridiskutis intrajn, edukajn problemojn. La tria REF (1981, Jilina, Ĉeĥoslovakio) estis akompana arango de seminario „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“, kie la infanoj prezentis sin antaŭ multnombra publiko, kaj la gepatroj faris klarigon pri la esenco de denaska esperantismo. Kaj fine, pasintjare (Augustintanya, Hungario) estis ne nur flanka celo la kutimiĝo de infanoj al naturaj viv- kaj kondutcirkonstancoj.

Ernö CSISZAR
(El „ESPERANTO“, 10/1983)

BATALKAMARADO ATANAS LAKOV

(80 JAROJ DE LIA NASKIGO)



Pasis jam plena jardeko depost la morto de Atanas Lakov — unu el la plej elstaraj agantoj de Bulgara Esperanto-Movado kaj gvidpersono de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA).

Modesta, senpretenda, etika, „senbrua“, Lakov estis laŭ eduko kaj vivkoncepto firma kaj senŝancela revoluciulo, marksisto-leninisto. Naskita en vilaĝo Sadovec, regiono de Pleven, en junio 1903, li estis atestanto de plej grandiozaj eventoj el la nova historio de l'homaro: Unua Mondmilito, Granda Oktobra Socialisma Revolucio, unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo en Bulgario (1923), eksplodo de la Dua Mondmilito, Granda Patrolanda Milito de Sovetunio, frakaso de la faŝisma militkoalicio de Germanio, Italio kaj Japanio, formiĝo de monda sistemo de socialismaj ŝtatoj ĉe-kape kun Sovetunio, grandioza socialisma konstruado, definitiva venko de l'socialismo en vico da ŝtatoj.

Tiuj eventoj, kun kiuj ege intime estas ligita ankaŭ la Naŭaseptembra armita ribelo en Bulgario (1944), donis riĉan spiritan nutraĵon al la ideo kaj estetika evoluo de Atanas Lakov. Li elkreskis kiel flama patrioto kaj internaciisto, konsekvenca adepto de la bulgara-soveta amikeco.

Esperantisto li estiĝis jam en la gimnazio de Pleven. En tiu urbo funkciis kerno de aktivaj kaj kleraj esperantistoj ĉe-kape kun Ivan Sarafov. Ĝi aperigis propagandan bulgarling-

van gazeton „Zelena Zvezda“ („Verda Stelo“) kaj samtitolan bibliotekon. Tio permesis al Lakov frue konatiĝi kun Esperanto kaj brile ekposedi ĝin. Depost 1926 li aktive okupiĝis pri tradukado en Esperanton de dekoj da bulgaraj progresemaj poetoj, pecipe de Ĥristo Smirnenski (1898—1923).

Pleven kaj ties regiono estis grava centro de la antifaŝista ribelo kontraŭ la puĉo de la faŝista burĝaro je la 9-a de junio 1923. La junulo Lakov trempiĝis en la atmosferon de l'popola kolerego kontraŭ la faŝistaj puĉistoj. Propraokule li konatiĝis kun la klasa malamego kaj venĝemo de la burĝaro al la venkitaj popoloamasoj: estis plej kruele mortigitaj multaj bravaj aktivuloj inter la laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj. Oni malpermesis ĉiujn ĝis tiam leĝajn laboristajn kaj kamparanajn progresemajn organizaĵojn, eĉ kooperativojn kun konsumkaraktero. . .

Persone mi konatiĝis kun Atanas Lakov kiam li alvenis Sofion aŭtune de 1928 por studi agronomion. Li estis mia samkursano en la Agronomia-Forstista Fakultato de la Sofia Universitato. Baldaŭ ni fariĝis intimaj amikoj kaj komune klopodis por disvastigo de gazeto „Studenta Tribuno“, al kiu post kelkaj monatoj mi estiĝis redaktoro. Tiu gazeto estis laŭleĝa eldono de la malpermesita Bulgara Junkomunista Asocio (Komsomolo). Ĝi defendis la interesojn de la malriĉa studentaro kaj lernantaro el la superaj klasoj de gimnazioj kaj profesiaj mezlernejoj. Ni partoprenis studentajn stratedemonstraciojn kaj strikojn kontraŭ la faŝisma diktaturo kaj kontraŭ la reacia politiko de la universitata estaro.

Kiel esperantistoj ni kontaktiĝis kun la sofia esperantistaro, kun progresemaj proletaj esperantistoj kaj fondis ĉefurban laboristan Esperanto-societon. Ĝi unua iniciatis eldonadon de laborista Esperanto-revuo kaj komisiis tion al ni ambaŭ. Ni elektis por la nova revuo la titolon „Balkana Laboristo“ (ja Bulgario estas Balkan-lando!). Lakov laboris senbrue, trankvile, tamen insiste kaj sisteme. „Balkana Laboristo“ populariĝis, ĝin disvastigis la formiĝintaj laboristaj Esperanto-societoj kaj grupoj en multaj urboj kaj eĉ en vilaĝoj. La revuo ege helpis la fondon de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA) en julio 1930 kaj nature estiĝis ties organo. Lakov estis unu el la plej elstaraj figuroj en la Centra Komitato de BuLEA.

Post la liberiĝo de nia lando el sub la faŝisma jugo li daŭre funkciis kiel membro de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, partoprenis aktive la redaktadon de ĝia organo „Bulgara Esperantisto“ kaj de bulgaraj numeroj de „Paco“, organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Lia atenta rilato al la agado de MEM faciligis lian vivku-

nulinon Tinka Lakova en la plenumado de gravaj funkcioj en MEM (membro de Internacia Komitato, sekretario de MEM, prezidanto de ties virina komisiono ktp.). Laŭ mia peto, lia filo, profesia pentristo, faris la titolon de „La Pacaktivulo“, uzata ĝis nun.

Atanas Lakov laboris ankaŭ en la vicoj de la internacia Esperanto-movado. Li estis inter la pioniroj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) en Bulgario dum la unua periodo de unuecfronta agado, kaj poste — de Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). Li estis komitatano de UEA, partoprenis kelkajn universalajn kongresojn kiel oficiala delegito de BEA,

estis vicprezidanto de LKK de la 48-a UK en Sofio (1963).

Lakov lasis profundan spuron en la vivo kaj agado de la bulgara progresema esperantistaro. Lia foresto el niaj vicoj sentigis akre dum tiuj dek jaroj post lia forpaso en 1973. En la nuna jaroni estus festintaj lian 80-jariĝon, se la morto ne estus forpreninta lin el nia medio. El mia persona vivo malaperis sindona kaj ŝatata amiko kaj samideano.

Tamen la ekzemplo de Atanas Lakov restos en la memoro de la nunaj kaj estontaj Esperantogeneracioj de Bulgario.

Nikola ALEKSIEV,
esperantista veterano

ORLIN ORLINOV

REMEMORO PRI INSULO „ESPERANTO“

Mi vidis Nicon, Rivieron,
mi vidis Napolon — revo nun,
mantelo kiel el purpuro,
banita en la suna lum'.
En golf' de Portofino estis
mi, kie bluserena akv',
flustras al migrant', majeste
samkiel voĉ' de Dalidá*.
Pompeon kaj Vezuvin — gloraj
kaj Vatikanon vidis mi,
sed ĉio kiel song' en foro
sub fremdĉielo restis bril'.

Sed malriĉulo senespera,
mi estus tie sur la tero,
kaj kvankam riĉa je impres',
fremdul' en mia hejm' mi estus,
se urbo unu en forges'
mankanta en l' atlasoj peza,
kaj sur la globoj de la mond' — Orjaĥovo —
al mi ne donis
belaĵojn en amika rond'
kaj rememorojn por estont'...

Insulo eta „Esperanto“!
Pri ĉio dankas mi el kor' —
dum luna nokt', maten' venanta,
kaj kiam ruĝo de l'aŭror'
orumas l' ondojn de Danubo
kaj la flugantaj birdoj mil,
la ŝultrojn kaj la orajn buklojn
de la knabino nekonata
de iu nekonata ŝip'.
Insulo eta „Esperanto“!
Pri vi nenion sciis mi,
se tuj subite allogante
ne brilis vi ĉe mia vid',
per la salikoj gaje verdaj
per via sablo — vera or'...
Moment' de lumigita sentoj, —
vi ĉiam restos en memor'!
Ĉu vi jam vidis „Esperanton“?

Se estis vi ĉe tiu bord',
al ĝi l'animo sopiranta
denove logos vin kun fort'.
Kaj poste ankaŭ por Sorento,
por Portofino, por la mond'
ne ŝanĝos vi de „Esperanto“
belecon ĉarman, en respond'.

*Franca kantistino, plenumanta kanton pri Portofino

ĤRISTO SMIRNENSKI

ROSA LUXEBURG

Neniam ni delasos fermuskolojn,
kaj fruntojn ne mallevos ni,
ĉar turnas jen la temp' per firma volo
la radon de la histori'.

Kaj super ĝi fajrerbrilantan glavon
akrigas ruĝa la gigant',
kaj en rigard' infana lia rava
ridetas la venkanta tag'.

Sed en animoj kiel nigra ŝtono
stariĝas kara rememor' —
ĝi staras en la blueflama fono
de la malĝojo kaj angor'.

La mort' kelkiam estas tro mizera,
la vivo — kruda en malhel',
kaj en la nigra enteriga ĉerko
anstataŭ korpo kuŝas stel'.
Leviĝas ĉe l'rigard' vulkana flamo —
vulkan' de faro kaj esper',
por enterigi unu koron tamen —
malvasta estas tuta ter'.

1923

MLADEN ISAEV

FESTA KANTO

Kun kampoj kaj arbaroj, lando,
vi staras sub septembra blu'!
Renkontas vi per ĝoj' kaj kantoj
la sunon en solena bru'.

La ventoj portas melodiojn
de ĉi rigora temp' kun flam' —
la voĉon de l'revolucio,
veninta kun malam' kaj am'.
Vastaĵojn kiajn ĝi malkovras
de l'venko antaŭ via voj'
post tiu montosupro fora,
en la revita ŝtat' de l'ĝoj'!
En la parol' de homoj, ventoj,
en la solenoj kaj jubil'
aŭdiĝas tiuj voĉoj, sentoj,
por ni senmortaj voĉoj mil.
Vi iru, lando nevenkita,
sub la altaĵoj al la sun'.
Ĉar la jarcento de militoj
atendas pacajn strebojn nun.
Kaj alta kiel la montaroj
al naskoland' transdonu vi
herede morgaŭ kaj la astrojn
kun verv' al la generaci'!

Tradukis: ATANAS LAKOV

GEORGI DIMITROV KAJ NIA KOOPERATIVA MOVADO

La senmorta filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov estas ne nur arda patrioto kaj konsekvenca internaciisto, sed ankaŭ granda kooperativa aganto. Tre gravaj estas liaj meritoj en la konstruado de la kooperativoj kiel amasaj organizoj de la laboruloj en ilia batalo por pli justa sociordo.

Por la evoluo de la kooperativa movado en Bulgario multe kontribuis la elekto de Georgi Dimitrov en 1919 en la estraron de la laborista kooperativo „Osvoboŝdenie“. La prospero de la kooperativo li vidas en la kunagado kun la laboristaj sindikataj unuiĝoj.

Kiel modela ekzemplo de defendo de la laboristaj kooperativoj restos la paroladoj de Georgi Dimitrov kiel deputito en la Parlamento (kaj ankaŭ ekster ĝi) kontraŭ la akcepto de reakciaj leĝoj, bremsantaj la disvolvigon de la kooperativa agado. Paralele kun tio tamen Georgi Dimitrov atentigis serioze, ke, ĉe la aktiveco de la „granda privata kapitalo“, oni ne devas supertaksi la eblojn de la kooperativoj en la sociala sfero, kaj oni ne devas enplanti malutilajn iluziojn inter la kooperativanoj pri vera plibonigo de ilia ekonomia stato. Tiuj instrukcioj havis decidigan rolon por la evoluo de la kooperativa movado en nia lando laŭ demokratia kaj progresema vojo.

Dum la jaroj de popola regado (post la 9-a

de Septembro 1944) Georgi Dimitrov faris ĉion eblan por plua evoluo de la kooperativa movado laŭ tiu sole ĝusta vojo. Li montris, ke „ne povas ekzisti forta kaj konstante evoluanta kooperativa movado sen kleraj, konsciaj kaj aktivaj kooperativanoj“.


Georgi Dimitrov havas kontribuon ankaŭ por la unuiĝo de la kooperativa movado, kiu en 1946 konsistis el 22 unuiĝoj kaj centraloj.

Plenumante liajn saĝajn direktivojn, jam en 1947 nia kooperativa movado unuiĝis en sian Centran Kooperativan Unuiĝon.

La gvidanto de l' bulgara popolo vidis la grandegan rolon de la diversspecaj kooperativoj en ĉiuj sferoj de la ekonomia kaj kultura vivo de la lando: komerco, servoj, elaĉetado, produktado, klerigado ka. Lia estas la merito por kreo de la agrikulturaj laborkooperativoj kiel plej taŭga formo por socialisma rekonstruo de la kamparmastrumo en la kondiĉoj de popoldemokratia reĝimo.

Grandan signifon Georgi Dimitrov atribuis ankaŭ al la metiistaj laborkooperativoj, kiuj unuiĝante la apartajn metiistojn, organizas la produktadon laŭ kolektiva principo kaj alkiutimigas la laborulojn al kolektiva laboro kaj amika interhelpo.

RUMJANA PEŜEVA, specialisto en la
Centra Kooperativa Unuiĝo




Unikaj fotoj de Georgi Dimitrov, faritaj dum lia restado en ripozloko Borĵomi (Soveta Gruzio) en 1934. La fotojn havigis al nia redakcio Agentejo „Sofia Press“.

ĈEFA CELO — LA BATALO POR PACA ESTONTO

Andropov Jurij: „60 jaroj de Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj“. Eldonejo APN, Moskvo, 1983. Formato 11×17 cm.

La libro enhavas la raporton de la Generala Sekretario de Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovet-Unio **Jurij Andropov** en la komuna solena kunveno, la 21-an de decembro 1982, dediĉita al la 60-jariĝo de la fondo de USSR. Post la mesaĝo de J. Andropov, en la raport-parto „Rezultoj de la trairita vojo kaj taskoj de la nacia politiko“ oni montras la bazajn punktojn, laŭ kiuj evoluis la unua socialisma ŝtato dum 60 jaroj.



La dua parto „USSR—bastiono de la granda afero de paco kaj libero de la popoloj“ estas dediĉita al la pacdefendo kaj ties rimedoj, al la paca kunezistado. En la raporto estas substrekite, ke „kiel ajn, kie ajn ekflamus la nuklea uragano, ĝi neeviteble eligus el sub kontrolo, kaŭzus totalan katastrofon.“ Pro tio oni devas strebi al tutmonda paco, ne permesi nuklean militon. La pozicioj de Sovet-Unio estas firmaj: ne uzi la unua nuklean armilaron. Kompreneble, unu el la ĉefaj metodoj por malpliigi la nuklemilitan minacon, estas subskribi kontrakton inter Sovet-Unio kaj Usono pri limigo de la nukleaj armiloj.

Plue la soveta ŝtatestro proponas, ke „Sovet-Unio konservu en Eŭropo tiom da raketoj, kiom da ili havas Anglio kaj Francio, kaj eĉ ne unu plian.“

„Konklude mi diru — deklaras Jurij Andropov, — ke Sovet-Unio faros ĉion de ĝi dependantan, por garantii al la nuna kaj venonta generacioj trankvilan pacan estonton. Tio estas la celo de nia politiko kaj pri ĝi ni ne rezignos.“

La raporto de la Generala Sekretario de Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovet-Unio ankaŭ foje montras la grandajn deziron kaj strebon de la soveta ŝtato vivi pace kaj amike kun ĉiuj popoloj en la mondo.

La libro en kompetenta traduko estas bele presita sur altkvalita papero.

V. D.

EL NIA SOCIETA VIVO

Uzino „Balkan“ en urbo Loveĉ estas konata en tuta Bulgario, eĉ en aliaj landoj.

Ĝojiga estas la fakto, ke inter la laboristaro de tiu ĉi uzino estas ankaŭ esperantistoj.

En la fino de aprilo j.k. oni celebris la 10-jaran datrevenon de tiu ĉi societo. Ĉeestis esperantistoj el la aliaj E-societoj en la urbo kaj el la DE de BEA en Loveĉ. Oni raportis pri varia kaj vigla societa agado. Estis premiitaj 11 aktivuloj de la Distrikta Estraro, inter ili ankaŭ la longjara merita esperantistino **Kina Uzunova**.

La renkontiĝo pasis en gaja kaj amika atmosfero.

D-rino Tjuran OMER

BRILA SUKCESO DE DAMJANOV

En n-ro 1—2/1983 de „Boletín“ de la Hispana E-Federacio ni tralegis interesan artikolon pri nia fama baritono Veselin Damjanov.

La aŭtoro L. Hernandez alte pritaksas la turneon de nia kantartisto en januaro en Hispanio. Estas menciitaj liaj brilaj sukcesoj en Madrid, Valladolid, Zaragoza, Barcelona, Villanueva y Geltru kaj Sabadell.

En „Boletín“ estas skribite: „Damjanov, per sia tembroriĉa voĉo kantis ariojn, fragmentojn el operejoj, italajn, rusajn kaj bulgarajn kanzonojn, kiuj ege plezurigis la ĉeestantaron“.

Grandan impreson al la publiko faris la kantoj, plenumitaj en Esperanto.

V. B.

DANKESPIRMO

La estraro de E-societo „Nigra Maro“ elkore dankas al k-do Kunĉo Vălev pro lia granda kelkbara helpo por preparado de niaj partoprenantoj en la naciaj E-revuoj kaj artkonkursoj.

Al k-do Vălev ni bondeziras sanon kaj multe da sukcesoj.

E-societo „Nigra Maro“, Burgas

PENSOJ PRI LA ARTKONKURSOJ

Kiel gvidantino de partoprenantoj en naciaj E-revuoj kaj artkonkursoj mi deziras dividi miajn pensojn pri ties organizo.

Ne estas agrable komenci per la malfacilaĵoj, sed tiuj vere ekzistas. Ĉiu deziranto reciti serĉas novajn versaĵojn en Esperanto, sed bedaŭrinde ĉiuj trovas pleskaŭ la samajn en la poemkolektoj „Elektitaj versaĵoj“ de Nikola Vapcarov aŭ „Septembra poezio“. Ni bezonas pli da materialoj. Ankaŭ E-kantoj ne estas troveblaj sufiĉe.

Mi scias, ke ne estas facile komponi melodion al Eteksto, kiu ankaŭ estu akceptebla por la plenumantoj, sed ĉu ni devas atendi, ĝis kiam ili mem komencos verki muzikon?

Lastatempe la E-revuoj estas bone organizataj. Ĉion oni sciigas ĝustatempe kaj ni havas eblecon prepari nin bone.

Al mi tre plaĉis la ideo de la organizantoj de la Vapcarov-konkurso en Bansko prepari koncerton de la premiitoj je la fino de la programo. Tie estas konvene anonci kaj disdoni la premiojn. Tre bone estus, se oni distingus ankaŭ la grupgvidantojn. Tiel estiĝas impulso por estonta laboro.

Mi proponas, ke la solena malfermo de E-revuoj kaj artkonkursoj okazu la antaŭan vesperon antaŭ la arango mem. Tiamaniere oni ne perdis tempon kaj la ĵurioj havus eblecon labori trankvile.

Elena STOJKOVA, Burgas



H. C. ANDERSEN

MALBONKONDUTA KNABO

Estis iam maljuna poeto, efektive bona maljuna poeto. Unu vesperon, kiam li sidis hejme, ekstere fariĝis malbonvetero; forte pluvegis, sed la poeto sidis varme kaj komforte ĉe sia kahela forno, en kiu brulis fajro kaj rostiĝis pomoj.

„Sur la malfeliĉuloj, kiuj en ĉi tiu malbona vetero estas ekstere, ne restos eĉ unu seka fadenol!“ li diris, ĉar li estis bonkora poeto.

„Ho, malfermu al mi! Estas al mi malvarme kaj tiel malseke!“ subite vokis ekstere malgranda infano. Ĝi ploris kaj frapadis je la pordo, dum la pluvo faladis torente kaj la ventego furiozis ĉe ĉiuj fenestroj.

„Ho, malfeliĉa estaĵo!“ diris la maljuna poeto kaj leviĝis, por malfermi la pordon. Tie staris malgranda knabo; li estis tute malseka, kaj la akvo fluis el liaj longaj blondaj haroj. Li tremis de malvarmo: se li ne estus enirinta, li certe pereus en la malbona vetero.

„Vi malgranda knabo!“ diris la maljuna poeto kaj prenis lin je la mano. „Venu al mi, mi jam varmigos vin! Ankaŭ vinon kaj pomon vi ricevos, ĉar vi estas belegaknabo!“

Tia li efektive estis. Liaj okuloj aspektis kiel du helaj steloj, kaj kvankam el liaj haroj fluis la akvo, ili tamen estis tre ĉarme krispaj. Li aspektis kiel malgranda anĝelo, sed li estis, pala de malvarmo kaj tremis per la tuta korpo. En la mano li tenis belegan pafarkon, kiu tamen estis tute difektita de la pluvo; la koloroj de la belaj sagoj tute intermiksiĝis pro la malseka vetero.

La maljuna poeto sidigis denove ĉe la forno, prenis la malgrandan knabon sur la genuojn, elpremis al li la akvon el la haroj, varmigus liajn manojn en siaj propraj kaj kuiris

por li dolĉan vinon. Tiam la knabo refortigis, ricevis ruĝajn vangojn, saltis malsupren sur la plankon kaj komencis danci ĉirkaŭ la maljuna poeto.

„Vi estas gaja knabo!“ diris la maljunulo. „Kia estas via nomo?“

„Mi estas nomata Amoro!“ li respondis; „ĉu vi min ne konas? Jen kuŝas mia pafarko. Per ĝi mi tre bone pafas. Rigardu, nun la vetero ekstere fariĝas denove bona; la luno lumas!“

„Sed via pafarko estas difektita!“ diris la poeto.

„Tio estus malbona!“ diris la malgranda knabo, kaj li prenis la pafarkon kaj esploris ĝin. „Ho, ĝi estas jam seka, kaj ĝi tute ne difektiĝis. La tendeno estas tute en ordo; nun mi ĝin elprovos!“ Kaj li streĉis la pafarkon, metis sur ĝin sagon, ekcelis kaj pafis al la maljuna bona poeto rekte en la koron. „Nun vi povas vidi, ke mia pafarko ne estis difektita!“ li diris, laŭte ekridis kaj forkuris.

La malbona knabo! Tiele pafi sur la maljunan poeton, kiu tiel afable akceptis lin en sian varman ĉambron, estis tiel bona por li kaj donis al li tiel belan vinon kaj plej bonan pomon!

La bona poeto kuŝis sur la planko kaj ploris, li estis trafita rekte en la koron.

„Fi!“ li diris, „kia malbonkondukta knabo estas tiu Amoro! Al ĉiuj bonaj infanoj mi tion rakontos, por ke ili povu gardi sin kontraŭ li kaj por ke ili neniam ludu kun li, ĉar li farus al ili nur malbonon.“

Ĉiuj bonaj infanoj, knabinoj kaj knaboj, al kiuj li tion rakontis, efektive estis singardaj kontraŭ la malbona Amoro, sed li tamen superruzis ilin, ĉar li estas tre lerta kaj ruza. Kiam la studentoj venas de la lekcioj, li iras apud ili, en nigra redingoto kaj kun libro sub la brako. Ili ne rekonas lin kaj tial enlasas lin en sian mezon, ĉar ili pensas, ke li ankaŭ estas studento; sed tiam li laboras al ili la bruston per sia sago. Kiam la knabinoj promenas, li ankaŭ ĉiam estas malantaŭ ili. Jes, en ĉiuj tempoj li estas malantaŭ la homoj. Li sidas en la granda lustro en la teatro kaj lumas tre hele, homoj pensas, ke tio estas lampo, sed poste ili rimarkas, ke tio estis io alia. Li kuradas en la reĝa parko kaj sur la remparoj; li iam pafis eĉ vian propran patron kaj vian propran patrinon rekte en la koron. Demandu ilin, kaj vi aŭdos, kion ili diros al vi. Jes, tio estas malbona knabo, tiu Amoro, neniam havu ian aferon kun li. Malantaŭ ĉiuj homoj li aperas. Prezentu al vi, li iam pafis sagon eĉ en la maljunan avinon. Estas vero, ke de tiam pasis jam multe da tempo, sed ŝi neniam tion forgesas. Fi, la malbona Amoro! Sed nun vi lin konas; rimarku, kia malbonkondukta knabo li estas!

Tradukis: D-ro L. L. ZAMENHOF

PAUTALIA — ANTIKVA KAJ NUNTEMPA...



Belarta galerio „Vladimir Dimitrov — la Majstro“ en la centro de urbo Kjustendil.

Kjustendil — la antikva Pautalia — ekzistis jarminojn, atingis pompon kaj ruinigon.

Nuntempe la grandaj kaj modernaj konstruaĵoj de bansanatorioj, la altaj kaj vastaj loĝdomoj karakterizas ties novan eksteran aspekton. Ĝiaj loĝantoj plimultiĝas rapide kaj per sia laboro kreas la novan vivritmon de la urbo.

Dum jarcentoj Kjustendil evoluis kiel fortikaĵo, ekonomia kaj administra centro, kiel fama banloko kaj kuraca centro. Granda riĉaĵo estas ĝiaj bone konataj varmaj termofontoj. Ties signifo ne malpliigis dum la jarcentoj kaj ili ĉiam kreis kondiĉojn por ekzisto de la loĝloko. La Kjustendila kaldronvalo havas gravan geografian situon. En ĝi kruciĝis gravaj komercaj kaj strategiaj vojoj — de Istanbul tra Plovdiv kaj Samokov al Skopje kaj Adriatiko, kaj de Tesaloniko, laŭ la valo de rivero Struma, al Sofio. La urbo situas en la suda parto de la kaldronvalo, ĉe la piedo de la altaĵo Hissarlak.

Kjustendil ekzistis sur tiu loko 25 jarcentojn. La unuaj fidindaj informoj pri la urbo estas de la II jc. de nia erao. Sur romia bronza monero unuafoje estas ĉizita ĝia unua nomo — Pautalia. Oni supozas, ke la radiko de la nomo estas „pote“ — fonto, do Pautalia signifas urbo de fontoj. Dum la romia regado ĝi

kreskis kiel fortikaĵo kaj fama kuracloko sur la Balkana Duoninsulo kaj eĉ en la tuta Romia Imperio.

Eblas supozi, ke Pautalia situis en la centra parto de la hodiaŭa Kjustendil. Simile al aliaj romiaj urboj, en ties mezo versajne levigis la forumo — kiel centro de la socia kaj komerca vivo. Aparte rimarkinda laŭ sia arkitektura aspekto estis la bankuraĵo, dediĉita al Asklepio — dio-kuracanto kaj urba protektanto. Ĝi okupis areon de ĉ. 3000 m² kaj fragmentojn de ĝi oni malkovris kaj konservis ĉe la hodiaŭa centra banejo. Grandan signifon havas la trovitaj ĉ. 900 specoj de moneroj, stampitaj en Pautalia. De ili ni ekscias, ke tiun regionon glorigis kvar ĉefaj riĉaĵoj: varmaj kuracfontoj, fruktoj (pomoj kaj vinberoj), greno kaj produktado de argento kaj oro.

Dum la Mezepoko la urbo estis konata sub la slava nomo Velbâjd, probable nomita tiel laŭ la nomo de iu slava reganto de tiu regiono. Sub osmana jugo la urbo ricevis novan nomon — Kjustendil.

La malpliigo de la turka loĝantaro en Kjustendil fortigis la bulgaran nacian memsenton. Granda manifestado estis la konstruado de la preĝejo „Sankta Dipatrino“ en 1816 kaj baldaŭ poste aperis la unua monaĥeja lernejo. Ili farigis centrojn de la batalo por eklezia kaj nacia libero. Dum la osmana regado en la Kjustendila regiono estis organizitaj ribelulaj taĉmentoj kontraŭ la fremda tiraneco. Konataj estas la taĉmentoj de Rumena kaj Iljo vojevodoj.

Post la Liberigo por klerigaj bezonoj estis konstruitaj lernejoj. Ekfunkciis pedagogia lernejo, kiu ankaŭ hodiaŭ kompletigas per sia impona eksteraĵo la arkitekturan aspekton de la centra placo. En Kjustendil oni malfermis la unuan lernejon pri fruktokulturado. En la urbo ekfunkciis unu post la alia industriaj entreprenoj. La plimulto el ili prilaboris lokajn krudaĵojn. Tamen la agrikulturo estis ĉefa vivtenrimedo.

La jaroj de rapida ekonomia evoluo ĉe la socialismo ŝanĝis la aspekton de Kjustendil. Hodiaŭ ĝi evoluas kiel urbo kun precipe industri-komercaj, kulturaj, administraj kaj kuracaj funkcioj. Aperis novaj industriaj entreprenoj — uzinoj por kondensiloj, por kuireja meblaro, ŝufabrika, entreprenoj por ladaj kaj drataj produktaĵoj. En la kaldronvalo apud la urbo ekfunkciis karbominejo, kaj en la Osogovo-monto oni denove akiras plumbo-zinkan ercon.

Kjustendil estas urbo ne nur kun longa historio, sed ankaŭ kun rimarkindaj kulturtradicioj. En ĝi evoluis aktiva kulturvivo en ĉiuj epokoj. Ĉi tie laboris kiel instruistoj kaj sociagantoj famaj klerigantoj. Kjustendil estas fama kiel urbo de pentristoj. La riĉa kaj bela naturo kaj la loka loĝantaro inspiris kaj formis la talenton de niaj popolpentristoj: Vladimir Dimitrov — la Majstro, Stojan Venev, Nikola Mirĉev, k.a. En Kjustendil naskiĝis la progresema verkisto kaj poeto Krum Kjuljajkov. Kun la urbo estas ligita la verkaro de vico da bulgaraj verkistoj kaj poetoj kiel Emanuel Popdimitrov, Georgi Stamatov, Maria Grubeŝlieva, Vesa Paspaleeva, Kiril Ĥristov kaj multaj aliaj.

Svetozar MATEV

Sur la unua kovrilpaĝo: la ĉarma eta plenumantino Veselka Koleva el Jambol.

Foto: Lada Milkova.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI,

prof. Vasil ĈOĈOV, Dimitar ĤAGĤIEV, Krâstju KARUCIN.

Administrantino — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado. Eldonkvanto — 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio

